PENTEKOSTO – 23a de majo 2010

LA SANKTA SPIRITO INSTRUOS VIN PRI ĈIO- Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 14, 15-16. 23-26

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:

“Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn. Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam.

Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. Kiu min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis.

Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas. Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi”.

Nur post kiam li kapabligis siajn disĉiplojn ami pere de la donaco de sia amo, kiu esprimiĝas en la piedlava rito kaj estas amo kiu fariĝas servo, tiam Jesuo petas amon al si. Fakte la unuan fojon Jesuo diras: “Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn”. Tio, kion petas Jesuo estas strangaĵo.

Jesuo lasis ununuran ordonon. Kial do li nun parolas pri ordonoj uzante la pluralan formon? Ekzistas ununura ordono, tiu pri la reciproka amo: “Amu vin unu la alian kiel mi amis vin ”, nome servu unu la alian – la amo ne estas vera se ĝi ne sin esprimas pere de servadoj. Tiu ĉi estas la ununura ordono.

La videblaj manifestadoj de tiu ununura ordono por Jesuo valoras kiel ordonoj. Tamen ili ne estas eksteraj reguloj kiujn la homo devas sekvi, sed ili estas la ekstera manifestado de intima realaĵo. La fakto ke mi min sentas tiom senmerite kaj senkondiĉe amata flanke de la Patro kondukas min ami la aliulojn. Tiuj ĉi estas la ordonoj.

“Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton”, tiu estas greka termino Paràkletos, kies ĝusta signifo estas: “tiu kiu estas alvokata por helpo”, por sukuri nin. Tiam ĝi povas esti ankaŭ protektanto. Parakleto ne estas la nomo de la Sankta Spirito, sed ĝi indikas lian taskon.

Do la Spirito estas taskita alvokiĝi por helpo, sed la tasko de tiu Spirito kiun Jesuo lasas ne respondas al bezonoj de la komunumo, fakte Jesuo diras: “por ke li restadu kun vi por ĉiam”. Dum la Parakleto estas tiu alvokita por helpo en okazoj de urĝa bezono, tiu ĉi Spirito kiun oni nomas jes ja Parakleto, nome protektanto, helpanto, ties ĉeesto ne estas subordigita al situacio de danĝero en la komunumo, sed ties ĉeesto estas konstanta.

Jesuo invitas siajn disĉiplojn al plena trankvilo, al plena konfido: “prizorgu nenion”, la Spirito ne intervenos kiam vi bezonos ĝin, sed la Spirito ĉiam ĉeestas pro tio ĝi antaŭvidas la momentojn de bezono, de malfacilaĵo de la komunumo.

Do, ties helpo, la helpo de la Spirito ne naskiĝas el la malfacilaĵoj sed ĝi ilin antaŭvidas.Tiu estas la bazo de la komununa trankvilo. Kaj Jesuo daŭrigas: “Se iu min amas” – kaj ĉi tie Jesuo atingas la kulminon de sia revelacio – “tiu observos mian vorton”, kaj tio signifas ke oni rekonis en la mesaĝo de Jesuo la deziron je pleneco kiun ĉiu homo havas en sia eno.

Kaj jen la sensacia revelacio: “kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li”. Tiel realiĝas la plano de Dio por la homo: temas pri Dio kiu ne estas malproksima kaj fora.Ne temas pri Dio kiu ensorbas la fortojn de la homo, ne temas pri Dio kiu altiras al si la homon, sed temas pri Dio kiu petas de la homo ke li Lin akceptu por kunfandiĝi kun li kaj plivastigi lian amkapablon.

Ni povus tion esprimi tiamaniere, tute ne estas ni kiuj ĉieleniras, sed estas la ĉielo kiu faras loĝon en ni, jen kial la vivo, tiu ĉi vivo estas nedetruebla. Do, ĉiu komunumo, ĉiu kredanto estas la ununura vera sanktejo el kiu disradias la amo de Dio.

Dum en la malnovan sanktejon la homoj devis iri, kaj ne ĉiuj estis enlasitaj, tiu ĉi nova sanktejo estos li kiu iros renkonten al la homoj, aparte al la flankenmetitaj kaj al la ekskluditaj de la religio.

Tiamaniere realiĝas tio kion Sankta Johano skribis en sia Prologo, nome, ke la verbo, la Vorto de Dio, la plano de Dio loĝis inter ni. La ununura vera sanktejo estas la homo kaj la kristana komunumo, do temas pri Dio kiu petas esti akceptata por kunfandiĝi kun la homo, Li ne estas Dio kiu ensorbas la fortojn de la homoj, sed Li estas Dio kiu komunikas al la homoj siajn energiojn.

Li estas Dio kiu ne petas de la homo ke li vivu por Li mem, sed ke li vivu de Li kaj kun Li kaj ke, kiel Li, li estu donaco de amo por la tuta homaro.

Do, “Ni venos al li kaj faros loĝon kun li”; tiu ĉi estas la belega manifestado de la plano de Dio por la homaro. Kaj poste Jesuo daŭrigas dirante: “Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas. Sed la Parakleto, la Sankta Spirito”, la unuan fojon Li ĝin nomas “sankta”, vorto kiu ne indikas nur ĝian kvaliton, ĝian sanktecon, sed ankaŭ ĝian taskon.

Kaj la tasko de la Spirito estas disigi la homon, kiu ĝin akceptas, el la mallumo de la morto por lin konduki en la lumon kaj en la vivon.

“Kiun la Patro sendos en mia nomo”, la nomo de Jesuo, en la hebrea lingvo ‘Jeshua’ signifas ‘la Sinjoro kiu savas’, do la savanto, “Li instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos...”. Tiu ‘rememorigi’ signifas ‘komprenigi’. Li vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi”. Kial tio?

Ĉar ju pli ni amas des pli ni permesas al la Spirito eniri en nin kaj des pli la realaĵoj de Dio, de Dio je amo, estos videblaj por ni kaj ni povos ilin kompreni.